Unu lerneja leciono pri Esperanto

Klaus Friese

en kunlaboro kun
Lu Wunsch-Rolshoven
kaj
Jürgen Wulff

Hamburgo
2015

Enhavo

1. Enkonduko....2
2. Argumentado....3
3. Eblecoj por daŭrigo....3
4. Skizoj por du instruhoroj 'Enkonduko de Esperanto'....4
5. Tekstoŝablono....5
6. Superrigardo pri vortoj (ekz. en la germana)....6
7. Teksto 'Kio estas Esperanto?'....7
8. Informoj el EsperantoLando:....8
La Internacia Lingvo Esperanto....8
Daŭra kreskado....8
Internaciaj Esperanto-renkontiĝoj....8
Kulturo....8
Interreto....8
Facile lernebla....8

1. Enkonduko

Esperanto estas planita lingvo, kiu verŝajne en preskaŭ tuta Eŭropo ne estas oficiale fiksita en la instruplanoj de la lernejoj. Tial mankas grava subteno por sciigi al pli vasta publiko pri la eblecoj kaj avantaĝoj de Esperanto por la internacia komunikado.

Tio estas la celo de ĉi tiu propono: **"Unu lerneja leciono pri Esperanto!"**

Ĉiu lernanto devus lerni iom pri Esperanto, minimume en unu leciono. Tio estas parto de la rajto je klerigado. La tuta instruado en lernejoj ofte daŭras pli ol 10 000 instruhorojn. En Germanio el tio ĉirkaŭ 1000 instruhoroj temas nur pri la instruado de la angla lingvo. Do, tiu eta postulo pri unu leciono pri Esperanto devus esti realigebla, ekzemple ene de la instruado de fremdaj lingvoj; oni povas uzi ekzemple tiulingvajn tekstojn el gazetoj pri Esperanto. Ankaŭ aliaj instrufakoj taŭgas (historio, sociaj kaj politikaj sciencoj). Krome ankaŭ anstataŭigaj instruhoroj (kiam la kutima instruisto ne ĉeestas) taŭgas bone por enkonduki la Internacian Lingvon.

La instruhoro por enkonduki Esperanton devus doni informojn pri la lingvo mem kaj pri ĝia aplikado, plej bone por 12- ĝis 16-jaraĝaj gelernantoj. Sed ankaŭ aliaj aĝoj taŭgas, se la koncepto estas adekvate adaptita.

Evidente unu sola instruhoro ofertas nur unuan kontakton al la internacia lingvo Esperanto. La enkonduko de tio en ĉiuj lernejoj certe kontribuas al pli granda akceptado de la ideo, ke scio pri Esperanto estas parto de la komuna kleriĝo. Plue imageblas daŭrigo kadre de projektsemajnoj kaj en libervolaj labor-grupoj; ankaŭ posttagmezaj horoj dum tut-taga instruado taŭgas. Ne forgesu la eblecon inviti esperantistojn kiel fakulojn (helpe de Esperanto-grupoj).

Por la preparo kaj realigado de la respektivaj instruhoroj respondecas la instruisto mem (aŭ la lernanto, kiu devas fari referaĵon). La materialoj prezentitaj en ĉi tiu teksto estas nur proponoj.

La du paĝoj 'Bonan matenon!' kaj 'Kio estas Esperanto' estas proponitaj kiel modelo por la realigo.

Krome du skizoj pri eblaj instruhoroj estas aldonitaj.

Ĉiu leganto estas invitata mem evoluigi kaj alsendi propran proponon por unu Esperanto-instruhoro.

Klaus Friese, Rosa-Schapire-Weg 9, 21035 Hamburg, friese@esperanto-hamburg.de
Ŝanĝita kaj suplementita kunlabore kun Lu Wunsch-Rolshoven kaj Jürgen Wulff.

© pri la titolbildo: violad, dollarphotoclub.com

2. Argumentado

Indas konsideri ĉefe la sekvajn punktojn:

1. Esperanto estas relative facile lernebla en mallonga tempo. Tial pli alta lingvo-nivelo estas atingebla en sama tempodaŭro kompare al la lernado de aliaj fremdaj lingvoj. Esperanto estas regule konstruita, do la plulernado povas okazi ofte memstare (se troviĝas adekvata intereso). Multaj gimnazianoj bezonas nur du au tri semajnfinajn kursojn (ĉ. 30 - 50 instruhoroj) kiel bazo por agrable partopreni en internaciaj renkontiĝoj.

2. La okupiĝo pri Esperanto havas pozitivan efikon por la lernado de aliaj lingvoj. Tio estas sekvo (interalie) de la facile rekonebla frazostrukturo de Esperanto (ekz. substantivoj finiĝas per -o , adjektivoj per -a, verboj per -as/is/os/us...).

3. Plia praktikado povas okazi en tre multaj landoj, ĉar Esperanto-aranĝoj estas ofertataj ankaŭ en multaj landoj. Krome oni uzas Esperanton en la reto, ekz. ĉe Facebook.

4. La postulon enkonduki unu solan Esperanto-instruhoron oni povas kompreneble fari ankaŭ por aliaj lingvoj. Eventuale tio estas kelkfoje jam realigata. Speciale estus oportune por la multaj lingvoj de la enlande loĝantaj enmigrintoj. Sed ankaŭ la lingvoj de niaj najbaraj landoj meritas pli da atento. Rilate al Esperanto ekzistas la ŝanco, ke ĉiuj grupoj de la enloĝantaro povas partopreni sammaniere. Estas klare, ke el tio sekvas positiva kontribuo por fortigi la heterogenan socion. ###(Eble ni akcentu pli multe, ke ankaŭ instruistoj ne parolantaj Esperanton povas oferti tiaĵon.)

5. Ankaŭ instruistoj kun nur minimumaj scioj pri Esperanto povas realigi la enkondukan instruadon sen granda tempobezono, sufiĉe taŭga materialo estas je dispono.

6. Esperanto subtenas la internacian komunikadon sur neŭtrala bazo.

3. Eblecoj por daŭrigo

Post realigo de la enkonduka Esperanto-instruado estos interesaj eblecoj por la profilo de lernejo. La koncepto gvidas al multaj vojoj por daŭrigo. En Germanio troviĝas taŭga enkonduka kurso 'Esperanto Schritt für Schritt' (Esperanto paŝon post paŝo). La kajero enhavas 40 paĝojn (DIN A5-formato), ĝin eldonis la Germana Esperanto-Junularo. Eblas pluokupiĝo per la kajeroj 2 + 3. Ĉiuj kajeroj troviĝas en la reto kiel pdf-dosieroj (http://www.u-matthias.de/kurse/kurse.htm). Certe sufiĉas uzi nur la unuan parton, ĉar en tiu projekto ja temas nur pri enkonduko.

Valoras kontaktoj al aliaj lernejoj, kiuj ankaŭ enkondukis Esperanton. Ekzemple menciindas la regule okazantaj kontaktoj inter Esperanto-lernantoj el la Esperanto-urbo Herzberg (Germanio) kaj la pola urbo Góra. Eksterordinare ĉarme estus, kompreneble, se tiamaniere evoluus interlandaj rilatoj.

4. Skizoj por du instruhoroj 'Enkonduko de Esperanto'

a) Propono 1

Komenco (ĉ. 5 min)

La instruisto salutas la klason per 'Bonan matenon!' (*Guten Morgen!*) aŭ 'Bonan tagon!' *(Guten Tag!*) esperante la saman respondon. Eventuale necesas konsideri jam ekzistantan scion kaj poste la vorto 'Esperanto' aperas sur la tabulo dum prezentado de mallongaj klarigoj.

Laboro kun la teksto (ĉ. 15 min)

Nun la paĝo 'Bonan matenon' estas disdonita kun prilabora tasko; povas esti ankaŭ evoluigo de la labor-tasko kun la tuta grupo. Depende de la situacio eble oni limiĝas al kelkaj partoj de la materialo. Eblas elekti inter diversaj labortipoj (ĉu en grupoj, individua laboro aŭ gvidata per la instruisto).

Ekzercado (ĉ. 10 min)

Du gelernantoj stariĝas antaŭ la klaso kaj realigas la salutan interparoladon en Esperanto; ili do diras kelkajn frazojn uzante la tekston. Eble ankaŭ du aliaj gelernantoj tiel prezentiĝas.
La instruisto donas komentojn kaj klarigojn pri la prononcado kaj la gramatiko.

Sekuriga fazo (ĉ. 10 min)

La gelernantoj skribas kelkajn novajn vortojn, eventuale ankaŭ frazojn al la tabulo; ili ankaŭ laŭtlegas kaj tradukas.

Fina fazo (ĉ. 5 min)

La instruisto zorgas pri mallonga resumo de la instruhoro kaj emfazas, ke ĉi tiu instruhoro povis oferti nur unuan kontakton al la internacia lingvo Esperanto. Poste li disdonas pliajn informmaterialojn, ekz. la tekston 'Kio estas Esperanto'.

b) Propono 2 (laŭ priskribo de *H. Lasarcyk, Ahrensburg, Germanio*)

Se la instruisto jam iomete scipovas Esperanton, li verŝajne tute libere gvidas la instruhoron, fakte preskaŭ unulingve, per nur minimumaj klarigoj kaj rekta komenco per: "Ni volas lerni novan lingvon." (*Wir wollen eine neue Sprache lernen*). Multaj gelernantoj jam nun kun fascino kunlaboras. Eventuale tio estas eta tropostulado kaj tiam helpas uzi la jenan frazon: "Mia nomo estas … , kaj via nomo ...?" (*Mein Name ist ... , und dein Name ... ?*). Post nelonga tempo iu diros: "Mia nomo estas Stefano." (*Mein Name ist Stefan*). Tuj sekvas la laŭdo: "Dankon, Stefano! Bonan tagon. Ĉu vi havas najbaron?" (*Danke, Stefan! Guten Tag. Hast du einen Nachbarn?*). Ĉe tio kompreneble eblas helpi per gestoj. Iom post iom la frazoj aperas sur la tabulo, por ke ĉiuj povu pli bone kompreni la signifon. Do, baldaŭ ĉiu el la tuta unua vico diros la nomon de sia najbaro: "Mia najbaro estas Ben." (*Mein Nachbar ist Ben*). Ne longe daŭras enkonduki la inan formon "najbarino" (*Nachbarin).*

5. Tekstoŝablono

Bonan matenon! Bonan tagon! Bonan vesperon! Saluton!

Kiu vi estas?	Mi estas Tesi.
El kiu lando vi venas?	Mi venas el Grekio.
En kiu urbo vi loĝas?	Mi loĝas en Ateno.
Kiu estas via profesio?	Mi estas lernanto.
En kiu klaso vi estas?	Mi estas en la sepa klaso.
Ĉu vi havas hejmbestojn?	Ne, mi ne havas hejmbestojn.
Kiom da jaroj vi havas?	Mi havas dek kvar jarojn.
Ĉu vi havas gefratojn?	Jes, mi havas unu fraton kaj du fratinojn.

1	unu	- landoj -	- urboj -	- profesioj -	- bestoj -
2	du				
3	tri	Germanio	Berlino	laboristo	urso
4	kvar	Danlando	Kopenhago	dentisto	bovo
5	kvin	Japanio	Tokio	ĝardenisto	fiŝo
6	ses	Senegalo	Dakaro	politikisto	leono
7	sep	Pollando	Varsovio	instruisto	ĉevalo
8	ok	Britio	Londono	fiŝisto	leporo
9	naŭ	Turkio	Ankarao	kuracisto	ŝafo
10	dek	Francio	Parizo	kondukisto	koko
11	dek unu	Pakistano	Islamabado	maristo	tigro
20	du dek	Belgio	Bruselo	biciklisto	muso
30	tri dek	Aŭstrio	Vieno	bakisto	aglo
100	cent	Rusio	Moskvo	tajloro	lupo

- p a r e n c o j -		
	av(in)o	
bopatr(in)o	patr(in)o	onkl(in)o
edz(in)o	frat(in)o	kuz(in)o
bofil(in)o	fil(in)o	nev(in)o
	nep(in)o	

Ĝis revido!

Ĝis baldaŭ!

parte el la Esperanto-Instrulibro "Tesi, la testudo", EsperantoLand, Berlin, p. 97 k.a.

La prononcado de Esperanto por [ekzemple] germanoj:

Vokalojn ĉiam prononcu mallonge kaj nefermite, kiel ekz. en H<u>e</u>ft, R<u>o</u>ck, Kr<u>a</u>ch, m<u>i</u>t, r<u>u</u>nd

c C<u>ä</u>sar ĉ T<u>sch</u>ad ĝ D<u>sch</u>ungel ĵ <u>J</u>ournal ŝ <u>Sch</u>iff ĥ na<u>ch</u>
v <u>W</u>ilhelm s Stra<u>ß</u>e (senvoĉa) z Ro<u>s</u>e (voĉa)
ŭ unuiĝas kun la tuj antaŭa vokalo (ekz. a) al nur unu silabo - aŭ kiel B<u>au</u>m -

Ĉiun vorton legu laŭ la skribmaniero! Akcentu ĉiam la antaŭlastan silabon!

6. Superrigardo pri vortoj (ekz. en la germana)

Guten Morgen! Guten Tag! Guten Abend! Sei gegrüßt!

Wer bist du?	Ich bin Tesi.
Aus welchem Land kommst du?	Ich komme aus Griechenland.
In welcher Stadt wohnst du?	Ich wohne in Athen.
Was ist dein Beruf?	Ich bin Schüler.
In welcher Klasse bist du?	Ich bin in der 7. Klasse.
Hast du Haustiere? *	Nein, ich habe keine Haustiere.
Wie alt bist du?	Ich bin 14 Jahre alt.
Hast du Geschwister? *	Ja, ich habe einen Bruder und zwei Schwestern.

1	eins	- Länder-	- Städte -	- Berufe -	- Tiere -
2	zwei				
3	drei			Arbeiter	Bär
4	vier			Zahnarzt	Rind
5	fünf			Gärtner	Fisch
6	sechs			Politiker	Löwe
7	sieben			Lehrer	Pferd
8	acht			Fischer	Hase
9	neun			Arzt	Schaf
10	zehn			Fahrer	Huhn
11	elf			Seemann	Tiger
20	zwanzig			Radfahrer	Maus
30	dreißig			Bäcker	Adler
100	hundert			Schneider	Wolf

- V e r w a n d t e -			**Auf Wiedersehen!** **Bis bald!**
	Opa/Oma		
Schwager/ Schwägerin	Vater/Mutter	Onkel/Tante	
Gatte/Gattin	Bruder/Schwester	Cousin/Cousine	
Schwiegersohn/ - tochter	Sohn/Tocher	Neffe/Nichte	
	Enkel/Enkelin		

** En Esperanto demandoj sen demandopronomo (kiu/kio...) ĉiam komenciĝas per 'ĉu'.*

7. Teksto 'Kio estas Esperanto?'

Kio estas Esperanto?

D-ro Ludviko Zamenhof kreis la internacian lingvon Esperanto kaj aperigis ĝin en 1887 sub la nomo 'LINGVO INTERNACIA'. La bazo de la vortprovizo estas internaciaj vortoj ĉefe el hindeŭropaj lingvoj, grandparte el la latinidaj lingvoj kiel ekz. la franca kaj la latina kaj el la ĝermanaj lingvoj kiel la angla kaj la germana. Multaj Esperanto-vortoj troviĝas en pluraj lingvoj (ekz. fenestro - germane „Fenster“, france „fenêtre“, itale „finestra“).

Multaj esprimoj en Esperanto estas por ni 'ĉiutagaj' fremdvortoj, [ekz. por germanoj]: aboni - abonnieren, ekologio - Ökologie, foto - Foto, kompleta - vollständig, rapida - schnell, tipa - typisch.

La gramatiko de Esperanto estas facile superrigardebla, ĝi baziĝas je nur 16 bazaj reguloj kun ruza sistemo el silaboj por vortfarado.

Ekzemplo por konjugacio (kun germana traduko):

vidi - sehen

mi vidas	- ich sehe	vi vidas	- du siehst
mi vidis	- ich sah / habe gesehen	vi vidis	- du sahst / hast gesehen
mi vidos	- ich werde sehen	vi vidos	- du wirst sehen
mi vidus	- ich würde sehen	vi vidus	- du würdest sehen

Ekzemplo por deklinacio, nur per nominativo kaj akuzativo, aliaj rilatoj bezonas prepoziciojn:

tablo	– Tisch		
la tablo	– der Tisch	la tabloj	– die Tische
la tablon	– den Tisch	la tablojn	– den Tischen
Mi donas al vi la libron	–	Ich gebe dir das Buch	

Ekzemploj por vortfaradaj afiksoj:

vivi – leben	vivo – Leben	viva – lebendig
pezi – wiegen	pezo – Gewicht	peza – schwer
fumi – rauchen	fumo – Rauch	fuma – rauchig

sana – gesund	malsana – krank	sanulo – Gesunder
sanigi – heilen	sanulejo – Krankenhaus	sanigebla – heilbar

Tiu principo simila al porinfanaj konstru-brikoj stimulas ankaŭ kreivan uzon de la lingvo. Ĝuste pro tia klara gramatika strukturo ankaŭ kompleksaj aferoj povas esti ekzakte esprimataj per Esperanto.

Esperanto sin proponas kiel facile lernebla, neŭtrala lingvo por la internacia komunikado. Estas suplemento kaj aldono, sen forpuŝado de la naciaj lingvoj!

8. Informoj el EsperantoLando:

La Internacia Lingvo Esperanto

La internacian lingvon Esperanto parolas kiel duan lingvon homoj el pli ol 100 landoj en la tuta mondo. En la jaro 1887 Ludoviko Zamenhof aperigis la bazon de tiu planita lingvo en Varsovio. Ekde tiam per ĉiama uzado ĝi evoluis al vivanta lingvo.

Daŭra kreskado

La nombro de la partoprenantoj de Esperanto-aranĝoj kreskas. Same la esperantlingva muziko plimultiĝas. En la reto Esperanto pli kaj pli videblas kaj Esperanto-paroj ĉiam pli ofte decidas, kreskigi siajn infanojn per Esperanto kiel kroma gepatra lingvo.

Internaciaj Esperanto-renkontiĝoj

Ĉiujare okazas centoj da internaciaj Esperanto-renkontiĝoj kaj kongresoj. Esperantoparolantoj vizitadas siajn amikojn en la tuta mondo kaj tiamaniere konatiĝas kun la diversaj landoj kaj iliaj homoj.

Kulturo

Ekzistas ampleksa literaturo kun faklibroj kaj beletro – tradukita el aliaj lingvoj aŭ verkita en tiu pontolingvo, kiu faciligas aliron al aliaj popoloj. Ĉiujare aperas proks. 120 novaj Esperanto-libroj; ekzistas centoj da gazetoj. Muzikaj grupoj uzas Esperanton por havi aliron al internacia publiko, aŭ ili kantas pri Esperanto, kiel la Hip-Hop-Bando *Freundeskreis*. Teatraĵoj traktas temojn el la vivo de la interpopola komunumo de la esperantoparolantoj.

Interreto

En la reto troviĝas multaj milionoj da paĝoj en Esperanto kaj pli kaj pli da sondosieroj kaj -filmoj, ekz. ĉe Youtube. Vikipedio (eo.wikipedia.org) enhavas pli ol 215 000 artikolojn kaj per tio atingas la 32-an rangon de la diversaj lingvoversioj. (En sept. 2015; monata kresko per proks. 1000 artikoloj). Ĉinio publigas sur esperanto.china.org.cn ĉiutagajn novaĵojn en Esperanto.

Facile lernebla

Pro sia internacia vortprovizo kaj sia regula gramatiko Esperanto estas multege pli rapide lernebla kompare al aliaj lingvoj. Du ĝis tri semajnfinaj kursoj normale sufiĉas por sukcese komenci konversacion kaj por trovi dum internaciaj kunvenoj unuan aliron al homoj el multaj diversaj landoj.

Pro tiu facila lernebleco multaj esperantoparolantoj akiras dum kelkaj jaroj tre bonan lingvo-kompetentecon, preskaŭ kompareblan al ilia gepatra lingvo.

EsperantoLand, Louis F. v. Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, 10551 Berlin, Tel. 030 – 685 58 31

Deutscher Esperanto-Bund (DEB) , Katzbachstraße 25, 10965 Berlin, Tel. 030 – 51 06 29 35

Unu paŝo al la alia
www.esperanto.de